ESPERANTO SUB
LA SUDA KRUCO



Numero 10 [1994/4] — Julio-Aŭgusto 1994

Organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Speciala numero: Konvencio pri la Rajtoj de la Infano

ISSN 1039-9380

Esperanto sub la Suda Kruco

Oficiala organo de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj
Redaktoro: Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio. ☎ 09 574 1307. Fakso: 09 574 1530.
Presfuŝisto: Odlo Bokserp. Adreso ĉe la redakcio.
Libroservo: Tom Elliott, PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio.

EN ĈI TIU NUMERO:

Konvencio pri la rajtoj de la infano (tr. Ralph Harry) 3
Aldonu al la Librokatalogo 1994 18
Lingva angulo (de Alan Towsey) 19
Deziras korespondi 22
Diversaĵoj 23
Pri Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto Education and Travel 24
El la regionoj 25
Nekrologo: Nelson Hill (verkis David Ryan) 26

SE VI DEZIRAS LEGI PRI IO VERKU ARTIKOLON!

Jes, ĉu vi ne ofte pensis kiam vi elkovertigis vian novan ekzempleron de *Esperanto sub la Suda Kruco*: "Ni vere bezonas artikolon pri..."? Do sendu tiun amatan eseon, ideon, rakont(et)on, esprimon de vidpunkto, ŝerc-desegnaĵon. Vi povas sendi viajn verkojn al ni tajpitajn aŭ sur 3½-colaj diskoj Macintosh aŭ MS-DOS. Se vi sendas manuskripton, bonvolu atenti: la teksto devas esti klare tajpita kun duobla spaco inter la linioj. Tajpu per freŝa rubando sur nur unu flankon de ĉiu folio. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas. Se vi deziras resendon de disko aŭ manuskripto, bonvolu kunsendi afrankitan taŭgan koverton.

Por konservi la lingvan nivelon de ĉi tiu gazeto la redaktoro rajtas korekti ĉiun tekston antaŭ aperigo. La redaktoro rajtas konformigi la artikolojn al la stilo kaj kutimoj de ĉi tiu gazeto. Laŭbezone artikolo povos esti mallongigita de la redaktoro. Ni ne povas promesi aperigon en la tuj sekvonta numero, krom se temas pri io kronologie urĝa. Pri la enhavo de artikolo respondecas nur ĝia aŭtoro. La publikigo aŭ nepublikigo de artikolo indikas nek aprobon nek malaprobon de ĝia enhavo fare de la redaktoro aŭ de la eldonantaj Asocioj.

Absoluta limdato por ricevo de kontribuoj por la venonta numero: 24 Aŭgusto.

KONVENCIO PRI LA RAJTOJ DE LA INFANO

TR RALPH HARRY

ANTAŬPAROLO

La Ŝtatoj Partioj en ĉi tiu Konvencio,

Konsiderante ke, laŭ la principoj proklamitaj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, agnosko de la natura digneco kaj de la egalaj kaj neforigeblaj rajtoj de ĉiuj membroj de la homa familio estas la fundamento de libereco, justeco kaj paco en la mondo,

Memorante, ke la popoloj de Unuiĝintaj Nacioj, en la Ĉarto, rekonfirmis sian kredon je la fundamentaj homaj rajtoj kaj je la digno kaj valoro de la homa personeco, kaj decidis antaŭenigi socian progreson kaj pli altan vivnivelon en pli granda libereco,

Agnoskante, ke Unuiĝintaj Nacioj, en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj kaj en la Internaciaj Konvencioj pri Homoj Rajtoj, proklamis kaj interkonsentis, ke ĉiu devas posedi ĉiujn rajtojn kaj liberecojn tie difinitajn sen kia ajn diferencigo, ekzemple laŭ raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia aŭ socia deveno, posedaĵoj, naskiĝo aŭ alia stato,

Rememorante, ke en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, Unuiĝintaj Nacioj proklamis, ke infaneco rajtigas al specialaj prizorgo kaj helpo,

Konvinkite, ke al la familio, kiel la fundamenta grupo de la socio kaj la natura medio por la kresko kaj bonfarto de ĉiuj siaj membroj kaj aparte de infanoj, devas esti donata la necesa protektado kaj helpo, tiel ke ĝi povas plene akcepti siajn respondecojn interne de la komunumo,

Agnoskante, ke la infano, por la plena kaj harmonia evoluo de sia personeco, devas kreski en familia medio, en atmosfero de feliĉo, amo kaj kompreno,

Konsiderante, ke la infano devas esti plene preparita por vivi individuan vivon en la socio, kaj edukita en la spirito de la idealoj proklamitaj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj, kaj aparte en la spirito de paco, digno, tolero, libereco, egaleco kaj solidareco,

Memorante, ke la bezono doni specialan prizorgon al la infano estas konstatita en la Ĝeneva Deklaracio de la Rajtoj de la Infano de 1924 kaj en la Deklaracio de la Rajtoj de la Infano akceptita de la Ĝenerala Asembleo la 20-an de Novembro 1959 kaj agnoskita en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, en la Internacia Konvencio pri Civilaj kaj Politikaj Rajtoj (aparte en artikoloj 23 kaj 24), en la Internacia Konvencio pri Ekonomiaj, Sociaj kaj Kulturaj Rajtoj (aparte en artikolo 10) kaj en la statutoj kaj rilataj dokumentoj de specialigitaj institucioj kaj internaciaj organizoj okupiĝantaj pri la bonfarto de infanoj,

Memorante, ke, kiel indikite en

la Deklaracio de la Rajtoj de la Infano la infano, pro sia korpa kaj mensa nematureco, bezonas apartajn sekurigilojn kaj prizorgon, inkluzive de taŭga jura protekto, kiel antaŭ tiel post la naskiĝo,

Rememorante la preskribojn de la Deklaracio pri Sociaj kaj Juraj Principoj rilate al la Protektado kaj Bonfarto de Infanoj, kun Speciala Rilato al Loĝigo ĉe Kromgepatroj kaj Adoptado Nacie kaj Internacie; la Minimumaj Normaj Reguloj de Unuiĝintaj Nacioj por la Administrado de Junula Justeco (La Pekinaj Reguloj); kaj la Deklaracio pri la Protektado de Virinoj kaj Infanoj en Krizoj kaj Armitaj Konfliktoj,

Agnoskante ke, en ĉiuj landoj de la mondo, estas infanoj kiuj vivas en escepte malfacilaj kondiĉoj, kaj ke tiaj infanoj bezonas specialan konsideradon,

Taŭge priatentante la gravecon de la tradicioj kaj kulturaj valoroj de ĉiu popolo por la protektado kaj harmonia evoluo de la infano,

Interkonsentis jene:

PARTO I

Artikolo 1

Por la celoj de ĉi tiu Konvencio, infano signifas ĉiun homon sub la aĝo de dek ok jaroj krom se, laŭ la juro aplikebla al la infano, plenaĝo estas atingata pli frue.

Artikolo 2

1. Ŝtatoj Partioj respektu kaj certigu la rajtojn formulitajn en ĉi tiu Konvencio al ĉiu infano al kiu etendas ilia jurisdikcio sen kia ajn diskriminacio, sen rigardo al la raso, haŭtkoloro, sekso, lingvo, religio, politika aŭ alia opinio, nacia etna aŭ socia origino, posedaĵoj, malkapablo, naskiĝo aŭ alia stato de la infano aŭ de ĝiaj gepatroj aŭ kuratoro.

2. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn rimedojn por certigi, ke la infano estu protektata kontraŭ ĉiuj formoj de diskriminacio aŭ puno surbaze de la stato, agado, esprimitaj opinioj, aŭ kredoj de la gepatroj, kuratoroj aŭ familianoj de la infano.

Artikolo 3

1. En ĉiu agado rilata al infanoj, ĉu entreprenita de publikaj aŭ privataj bonfaraj institucioj, kortumoj, administraj instancoj aŭ leĝfaraj organizoj, la plej bonaj interesoj de la infanoj estu ĉefa konsidero.

2. Ŝtatoj Partioj sin devigas certigi al la infano tian protektadon kaj prizorgon kia necesas por ĝia bonfarto, prenante en konsideron la rajtojn kaj devojn de ĝiaj gepatroj, laŭjuraj kuratoroj aŭ aliaj individuoj kiuj laŭjure respondecas pri ĝi, kaj tiucele, uzi ĉiujn taŭgajn leĝofarajn kaj administrajn rimedojn.

3. Ŝtatoj Partioj certigu, ke la institucioj, servoj kaj agentejoj kiuj respondecas pri la prizorgado aŭ protektado de infanoj estu konformaj al la normoj establitaj fare de kompetentaj instancoj, aparte sur la kampoj de sekureco kaj sano, rilate la nombron kaj taŭgecon de siaj staboj, same kiel rilate kompetentan kontroladon.

Artikolo 4

Ŝtatoj Partioj entreprenu ĉiujn taŭgajn leĝofarajn, administrajn kaj aliajn paŝojn por la plenumo de la rajtoj agnoskitaj en ĉi tiu Konvencio. Rilate la ekonomiajn, soci-

ajn kaj kulturajn rajtojn, Ŝtatoj Partioj entreprenu tiajn paŝojn ĝis la maksimumaj eblecoj de siaj haveblaj resursoj kaj, laŭbezone, interne de la kadro de internacia kunlaborado.

Artikolo 5

Ŝtatoj Partioj respektu la respondecojn, rajtojn kaj devojn de gepatroj, aŭ kie konvenas de la membroj de la etendita familio aŭ komunumo kiel preskribas loka kutimo, kuratoroj aŭ aliaj personoj kiuj laŭjure respondecas pri la infano, por provizi, en maniero konforma al la evoluantaj kapabloj de la infano, taŭgan direktadon kaj gvidadon en la uzado, fare de la infano, de la rajtoj agnoskitaj en ĉi tiu Konvencio.

Artikolo 6

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas, ke ĉiu infano havas la naturan rajton al vivo.

2. Ŝtatoj Partioj certigu, ĝis la maksimuma grado, la pluvivon kaj evoluigon de la infano.

Artikolo 7

1. La infano estu registrita tuj post naskiĝo kaj havu la rajton ekde naskiĝo al nomo, la rajton akiri ŝtatanecon kaj, kiom eble, la rajton koni kaj esti prizorgata de siaj gepatroj.

2. Ŝtatoj Partioj certigu la plenumadon de ĉi tiuj rajtoj konforme al sia nacia juro kaj siaj devoj laŭ la rilataj internaciaj interkonsentoj sur ĉi tiu kampo, aparte kie la infano alikaze estus senŝtata.

Artikolo 8

1. Ŝtatoj Partioj sin devigas respekti la rajtojn de infano konservi sian identecon, inkluzive sian naciecon, nomon kaj familiajn rilatojn kiel agnoskite de la juro sen kontraŭleĝa entrudo.

2. Kiam infano estas kontraŭleĝe senigita de kelkaj aŭ ĉiuj elementoj de sia identeco, Ŝtatoj Partioj donos taŭgan helpon kaj protektadon, cele rapide restarigi ĝian identecon.

Artikolo 9

1. Ŝtatoj Partioj certigu, ke infano ne estu apartigita disde siaj gepatroj kontraŭ ilia volo, krom se kompetentaj instancoj submetitaj al juĝista revizio, decidas, laŭ la aplikebla juro kaj proceduro, ke tia apartigo necesas por la plej bonaj interesoj de la infano. Tia decido povus esti necesa en specifa kazo ekzemple kiam estas misuzado aŭ neglekto de la infano fare de la gepatroj, aŭ kiam la gepatroj loĝas aparte kaj decido estas farenda kie la infano loĝu.

2. En kiu ajn procesado, sekve de paragrafo 1-a de ĉi tiu artikolo, al ĉiuj partioj kun interesoj estu donitaj ŝancon partopreni en la procesado kaj sciigi sian vidpunkton.

3. Ŝtatoj Partioj respektu la rajton de infano, kiu estas apartigita disde unu aŭ ambaŭ gepatroj, daŭrigi personajn interrilatojn kaj senperan regulan kontakton kun ambaŭ gepatroj krom se tio estus kontraŭ la plej bonaj interesoj de la infano.

4. Kiam tia apartigo rezultas de iu ago iniciatita de Ŝtato Partio, ekzemple la reteno, enkarcerigo, ekzilo, elpatrujigo, aŭ morto (inkluzive de morto estiĝante el kiu ajn kaŭzo dum la persono estas en la gardado de la Ŝtato) de unu aŭ ambaŭ ge-

patroj aŭ de la infano, tiu Ŝtato Partio, se petite, provizos al la gepatroj, la infano aŭ, se konvenas, al alia familiano la esencan informaĵon pri la kieo de la forestanta membro de la familio krom se la provizo de la informaĵo malbone efikus al la bonfarto de la infano. Ŝtatoj Partioj aldone certigu, ke la faro de tia peto mem ne okazigos malbonajn sekvojn al la koncernataj personoj.

Artikolo 10

1. Konforme al la devoj de Ŝtatoj Partioj laŭ artikolo 9, paragrafo 1, petoj de infano aŭ ĝiaj gepatroj eniri aŭ foriri el Ŝtato Partio por familia reuniĝo estu traktataj fare de Ŝtatoj Partioj pozitive, humane kaj rapide. Ŝtatoj Partioj aldone certigu, ke la faro de tia peto ne estigu malfavorajn sekvojn al la petintoj kaj membroj de ilia familio.

2. Infano kies gepatroj loĝas en apartaj Ŝtatoj havu la rajton daŭrigi, krom en esceptaj cirkonstancoj, personajn interrilatojn kaj senperajn kontaktojn kun ambaŭ gepatroj. Tiucele, kaj konforme al la devo de Ŝtatoj Partioj laŭ artikolo 9, paragrafo 2, Ŝtatoj Partioj respektu la rajton de la infano kaj ĝiaj gepatroj eliri el kiu ajn lando, inkluzive la propran, kaj eniri en sian propran landon. La rajto eliri el kiu ajn lando estu sub nur eventualaj limigoj preskribitaj de la juro kaj necesaj por protekti la publikan ordon (*ordre public*), publikan sanon aŭ moralon aŭ la rajtojn kaj liberecojn de aliaj kaj konforme al la aliaj rajtoj agnoskitaj en la nuna Konvencio.

Artikolo 11

1. Ŝtatoj Partioj apliku rimedojn por kontraŭbatali la kontraŭleĝan transsendon de infanoj eksterlanden kaj ilian neresendon.

2. Tiucele, Ŝtatoj Partioj antaŭenigos la finfaron de duflankaj kaj multflankaj interkonsentoj aŭ partiiĝo en ekzistantaj interkonsentoj.

Artikolo 12

1. Ŝtatoj Partioj certigu, al infano kapabla formi sian propran vidpunkton, la rajton tion libere esprimi en ĉiuj aferoj, kiuj tuŝas la infanon, donante al la vidpunkto de la infano taŭgan gravecon laŭ ties aĝo kaj matureco.

2. Tiucele al la infano aparte estu donata ŝancon esti aŭdata en ĉiuj juĝaj aŭ administraj procesoj kiuj tuŝas la infanon, ĉu senpere ĉu per reprezentanto de taŭga instanco, en maniero konvena al la proceduraj reguloj de nacia juro.

Artikolo 13

1. La infano havu la rajton al libereco de esprimado; tiu rajto inkludu liberecon peti, ricevi kaj komuniki informojn kaj ideojn ĉiaspecajn, senkonsidere pri landlimoj, ĉu buŝe ĉu skribe ĉu presaĵe, en la formo de arto, aŭ per kiu ajn alia rimedo elektita de la infano.

2. La uzado de ĉi tiu rajto povas esti sub iuj limigoj, sed tiuj estu nur tiuj, kiujn preskribas la juro kaj kiuj necesas:

(a) Por respekti la rajtojn aŭ bonan reputacion de aliaj

(b) Por la protektado de nacia sekureco aŭ publika ordo (*ordre public*), aŭ de publika sano aŭ moralo.

Artikolo 14

1. Ŝtatoj Partioj respektu la rajton de la infano al libereco de penso,

konscio kaj religio.

2. Ŝtatoj Partioj respektu la rajtojn kaj devojn de la gepatroj kaj, kiam konvenas, de kuratoroj, provizi gvidadon al la infano en la uzado de sia rajto en maniero konforma al la evoluantaj kapabloj de la infano.

3. Libereco manifesti sian religion aŭ kredojn estu subigita nur al tiaj limigoj kiaj estas preskribitaj de la juro kaj necesaj por protekti la publikan sekurecon, ordon, sanon aŭ moralon aŭ la fundamentajn rajtojn kaj liberecojn de aliaj.

Artikolo 15

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de la infano al libereco de asociiĝo kaj al libereco de pacema kunvenado.

2. Neniuj limigoj estu faritaj al la uzado de tiuj rajtoj krom tiuj surmetitaj konforme kun la juro kaj necesaj en demokratia socio en la intereso de nacia aŭ publika sekureco, publika ordo (*ordre public*), la protektado de publika sano aŭ moralo aŭ la protektado de la rajtoj kaj liberecoj de aliaj.

Artikolo 16

1. Neniu infano estu subigita al arbitra aŭ kontraŭleĝa entrudo en ĝian privatecon, familion, hejmon aŭ korespondaĵon, nek al kontraŭleĝaj atakoj kontraŭ ĝia honoro kaj bona reputacio.

2. La infano rajtas la protektadon de la juro kontraŭ tiaj entrudo aŭ atakoj.

Artikolo 17

Ŝtatoj Partioj agnoskas la gravan funkcion plenumatan de la amaskomunikiloj kaj certigu, ke la infano havu aliron al informaĵo kaj materialo el diversaj naciaj kaj internaciaj fontoj, aparte tiuj kiu celas la antaŭenigon de ĝia socia, spirita kaj morala bonfarto kaj fizika kaj mensa sano. Tiucele Ŝtatoj Partioj:

(*a*) Stimulu la amaskomunikilojn dissendi informaĵon kaj materialon de socia kaj kultura bono al la infano kaj laŭ la spirito de artikolo 29;

(*b*) Stimulu internacian kunlaboradon en la produktado, interŝanĝo kaj dissendado de tia informaĵo kaj materialo el diversaj kulturaj, naciaj kaj internaciaj fontoj;

(*c*) Stimulu la produktadon kaj dissendadon de porinfanaj libroj;

(*d*) Stimulu la amaskomunkilojn speciale atenti la lingvajn bezonojn de infano, kiu apartenas al minoritata grupo aŭ kiu estas indiĝena;

(*e*) Stimulu la evoluon de taŭgaj gvidindikoj por la protektado de la infano kontraŭ informaĵo kaj materialo kiu malutilus al ĝia bonfarto, atentante la preskribojn de artikoloj 13 kaj 18.

Artikolo 18

1. Ŝtatoj Partioj uzu siajn plej bonajn klopodojn por certigi agnoskon de la principo, ke ambaŭ gepatroj havas komunajn respondecojn por la edukado kaj evoluigo de la infano.

Gepatroj aŭ, laŭ la kazo, kuratoroj, havas la ĉefan respondecon por la edukado kaj evoluigo de la infano. La plej bonaj interesoj de la infano estu ilia baza prizorgo.

2. Por garantii kaj antaŭenigi la rajtojn formulitajn en ĉi tiu Konvencio, Ŝtatoj Partioj donu taŭgan

helpon al gepatroj kaj kuratoroj por la plenumado de siaj respondecoj de infanedukado kaj certigu la evoluigon de institucioj, rimedoj kaj servoj por la prizorgado de infanoj.

3. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn rimedojn por certigi, ke infanoj de laborantaj gepatroj havu la rajton profiti de infanvartaj servoj kaj rimedoj por kiuj ili havas la kvalifikon.

Artikolo 19

1. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn leĝofarajn, administrajn sociajn kaj edukajn rimedojn por protekti la infanon de ĉiuj formoj de fizika aŭ mensa perforto, difekto aŭ misuzo, neglekto aŭ neglektema traktado, mistraktado aŭ fiekspluatado, inkluzive de seksa mistraktado, dum ĝi estas en la prizorga respondeco de gepatro(j), kuratoro(j) aŭ kiu ajn alia persono kiu prizorgas la infanon.

2. Tiaj protektaj rimedoj devas, kiel konvenas, inkludi efikajn procedurojn por la starigo de sociaj programoj, kiuj provizu necesan subtenon por la infano kaj por tiuj kiuj prizorgas ĝin, kaj ankaŭ por aliaj formoj de preventado kaj por malkovri, raporti, direkti, esplori, pritrakti kaj sekvi kazojn de infanmistraktado ĉiantaŭe priskribitaj, kaj kiam taŭgas envoki la juĝejajn instancojn.

Artikolo 20

1. Infano kelktempe aŭ por ĉiam senigita disde sia familia medio, aŭ kiun por ĝiaj plej bonaj interesoj oni ne povas permesi resti en tiu medio, rajtu specialan protektadon provizitan de la ŝtato.

2. Ŝtatoj Partioj certigu laŭ siaj naciaj juroj alternativan prizorgadon por tia infano.

3. Tia prizorgado povus inkludi, *inter alia* (inter aliaj aferoj) loĝigo ĉe kromgepatroj, *kafalah* de islama juro, adopto aŭ se necese loĝigo en taŭgaj institucioj por la vartado de infanoj. Konsiderante solvojn, oni taŭge atentu la dezireblecon de kontinueco en la edukado de infano kaj de la etna, religia, kultura kaj lingva medio.

Artikolo 21

Ŝtatoj Partioj kiuj agnoskas kaj/aŭ permesas la sistemon de adopto certigu, ke la plej bonaj interesoj de la infano estu la superrega konsidero kaj ili:

(*a*) Certigu ke la adopto de la infano estu aprobita nur de kompetenta instanco, kiu decidu, laŭ la aplikebla juro kaj proceduro kaj surbaze de ĉiu rilata kaj fidinda informaĵo, ke la adopto estas permesebla konsiderante la staton de la infano rilate gepatrojn, parencojn kaj kuratorojn kaj ke, se necese, la koncernaj personoj donis, post informiĝo, sian konsenton al la adopto surbaze de tia konsilado;

(*b*) Agnosku, ke interlanda adopto povas esti konsiderata kiel alternativa metodo de infanprizorgo, se la infano ne povas esti lokigita en nutropatrina aŭ adopta familio aŭ ne povas esti taŭge prizorgata en la patrujo de la infano;

(*c*) Certigu, ke la koncerna infano, pere de interlanda adopto, ĝuas garantiojn kaj normojn ekvivalentajn al tiuj kiuj ekzistas en la kazo de nacia adopto;

(*d*) Uzu ĉiuj taŭgajn rimedojn por certigi, ke, en interlanda adopto, la lokigo ne rezultigas malkonvenan

financan profiton por tiuj kiuj partoprenas;

(*e*) Antaŭenigu, kiam taŭgas, la celojn de ĉi tiu artikolo per la faro de duflankaj aŭ multflankaj aranĝoj aŭ interkonsentoj, kaj klopodu, en ĉi tiu kadro, certigi, ke la lokigo de la infano en alian landon estas plenumita de kompetentaj instancoj aŭ organoj.

Artikolo 22

1. Ŝtatoj Partioj uzu taŭgajn rimedojn por certigi, ke infano kiu celas la staton de rifuĝinto, aŭ kiu estas konsiderata rifuĝinto laŭ aplikebla internacia aŭ nacia juro kaj proceduro, ĉu neakompanata ĉu akompanata de siaj gepatroj aŭ de alia persono, ricevu taŭgan protektadon kaj humanan helpon por ĝui la aplikeblajn rajtojn formulitajn en ĉi tiu konvencio kaj en aliaj dokumentoj pri homaj rajtoj aŭ humaneco al kiuj tiuj ŝtatoj estas partioj.

2. Tiucele, Ŝtatoj Partioj, kiel ili konsideras taŭge, kunlaboru en ĉiuj klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj kaj aliaj kompetentaj interregistaraj aŭ neregistaraj organizoj kunlaborantoj kun Unuiĝintaj Nacioj por protekti kaj helpi tian infanon kaj por trovi la gepatrojn aŭ aliajn familianojn de rifuĝinta infano por trovi informaĵon necesan por reunuiĝo kun ĝia familio. En kazoj kiam nek patro nek patrino nek alia familiano estas trovebla, estu donita al la infano la sama protektado kiel al kiu ajn alia infano por ĉiam aŭ kelktempe senigita disde sia familia medio pro kiu ajn kialo, kiel preskribate en ĉi tiu konvencio.

Artikolo 23

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas, ke mense aŭ fizike kripligita infano devas ĝui plenan kaj decan vivon, en kondiĉoj kiuj certigu dignecon, antaŭenigu memfidon kaj faciligu la aktivan partoprenon de la infano en la komunumo.

2. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de kripligita infano al speciala prizorgo kaj ili stimulu kaj certigu, laŭ la havebleco de rimedoj, ke oni donu al la rajtanta infano kaj al tiuj, kiuj respondecas pri ĝia prizorgo, helpon por kiu oni faris peton kaj kiu taŭgas al la kondiĉo de la infano kaj la cirkonstancoj de la gepatroj aŭ aliaj prizorgantoj de la infano.

3. Agnoskante la specialajn bezonojn de kripligita infano, helpo donita laŭ paragrafo 2 de la nuna artikolo estu donata senpage, kiam ajn eble, konsiderante la financajn rimedojn de la gepatroj kaj aliaj prizorgantoj, kaj ĝi celu certigon, ke la kripligita infano havu efikan aliron al, kaj ricevu instruadon, edukadon, servojn por la prizorgo de la sano, rekapabligajn servojn, preparadon por dungiĝo kaj distriĝajn okazojn laŭ maniero favora al la atingo, fare de la infano, de kiel eble plej plena socia integreco kaj individua evoluo, inkluzive de ĝia kultura kaj spirita evoluo.

4. Ŝtatoj Partioj antaŭenigu, en spirito de internacia kunlaborado, la interŝanĝon de taŭga informaĵo sur la kampo de preventa prizorgo de la sano kaj de medicina, psikologia kaj funkcia traktado de kripligitaj infanoj, inkluzive de dissendado de kaj aliro al informaĵo koncerne metodojn de rekapabligo, edukado kaj primetiaj servoj, cele

ebligi Ŝtatojn Partiojn plibonigi siajn kapablojn kaj lertojn kaj plilarĝigi sian sperton en tiuj aspektoj. Tiurilate, oni speciale priatentu la bezonojn de evoluantaj landoj.

Artikolo 24

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de la infano al ĝuado de la plej alta atingebla normo de sano, kaj al faciligoj por la kuracado de malsano kaj por la restaŭro de sano. Ŝtatoj Partioj strebu certigi, ke neniu infano estu senigita disde sia rajto de aliro al tiaj sanservoj.

2. Ŝtatoj Partioj daŭre celu plenan plenumon de ĉi tiu rajto kaj, speciale, uzu taŭgajn rimedojn:

(*a*) Malpliigi la beban kaj infanan mortokvanton;

(*b*) Certigi la provizon de necesa medicina helpo kaj sanprizorgado al ĉiuj infanoj, kun aparta atento al la evoluigo de ĉefa sanprizorgo;

(*c*) Kombati malsanon kaj malsufiĉan nutriĝon, inkluzive en la kadro de ĉefa sanprizorgo, per, *inter alia* (inter aliaj aferoj), la aplikado de facile havebla teknologio kaj per la provizo de sufiĉe nutraj manĝaĵoj kaj pura trinkakvo, konsiderante la danĝerojn kaj riskojn de media polucio;

(*d*) Certigi taŭgan antaŭnaskan kaj postnaskan sanprizorgon por patrinoj;

(*e*) Certigi, ke ĉiuj eroj de la socio, speciale gepatroj kaj infanoj, estu informataj, havu aliron al edukado, kaj estu subtenataj en la uzado de baza scio pri infana sano kaj nutrado, la avantaĝoj de mamnutrado, higieno kaj sanitaraj aranĝoj favoraj al la medio, kaj la prevento de akcidentoj;

(*f*) Evoluigi preventan sanprizorgadon, gvidadon al gepatroj kaj edukado kaj servoj por familia planado (naskobrido);

3. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn efikajn kaj taŭgajn rimedojn cele la forigon de tradiciaj praktikoj malutilaj al la sano de infanoj.

4. Ŝtatoj Partioj sin devigas antaŭenigi kaj stimuli internacian kunlaboradon cele la plenan efektivigon iom post iom de la rajto agnoskita en ĉi tiu artikolo. Tiurilate, oni speciale priatentu la bezonojn de evoluantaj landoj.

Artikolo 25

Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de infano kiu estas enlokigita (en institucion ktp) fare de kompetentaj instancoj por prizorgado, protektado aŭ kuracado de sia fizika aŭ mensa sano, al perioda revizio de la traktado provizita al la infano kaj de ĉiuj aliaj cirkonstancoj rilatantaj al ĝia enlokigo.

Artikolo 26

1. Ŝtatoj Partioj agnosku por ĉiu infano la rajton profiti de sociala sekureco, inkluzive asekuron, kaj uzu la necesajn rimedojn por atingi la plenan efikigon de ĉi tiu rajto laŭ sia nacia juro.

2. Oni provizu la beneficojn konsiderante la rimedojn kaj cirkonstancojn de la infano kaj de personoj kiuj respondecas pri ties subtenado, same kiel kiun ajn alian konsideron rilatantan al peto de benefico farita de aŭ pro la infano.

Artikolo 27

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de ĉiu infano al vivnivelo adekvata por la fizika, mensa, spirita, morala kaj socia evoluo de la infa-

no.

2. La gepatroj aŭ aliaj personoj kiuj respondecas pri la infano havas ĉefan respondecon certigi, laŭ siaj kapablecoj kaj financaj rimedoj, la vivkondiĉojn necesajn por la evoluo de la infano.

3. Ŝtatoj Partioj, laŭ la naciaj kondiĉoj kaj siaj financaj rimedoj, uzu taŭgajn rimedojn helpi gepatrojn kaj aliajn personojn, kiuj respondecas pri la infano, efektivigi ĉi tiun rajton kaj, se necese, provizu programojn de materiala helpo, precipe rilate nutradon, vestojn kaj loĝejojn.

4. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn rimedojn certigi la regajnon de subtenpago por la infano el la gepatroj aŭ aliaj personoj kiuj finance respondecas pri la infano, kaj en la Ŝtato Partio kaj el eksterlando. Aparte, kie la persono kiu finance respondecas pri la infano loĝas en ŝtato alia ol tiu de la infano, Ŝtatoj Partioj stimulu aliron al internaciaj interkonsentoj aŭ la faron de tiaj interkonsentoj, kaj ankaŭ la faron de aliaj aranĝoj.

Artikolo 28

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de infano al edukado, kaj cele la efikigon de tiu rajto, iom post iom kaj surbaze de egalaj okazoj, ili precipe:

(*a*) Faru ĉefan edukadon devigan kaj haveblan senpage de ĉiuj;

(*b*) Stimulu la evoluon de diversaj formoj de mezgrada edukado, inkluzive ĝeneralan kaj metian edukadon, faru ilin haveblaj kaj alireblaj de ĉiu infano, kaj uzu taŭgajn rimedojn, ekzemple la enkondukon de senpaga edukado kaj la proponon de financa helpo en kazoj de bezono;

(*c*) Faru superan instruadon alirebla de ĉiuj surbaze de kapableco per ĉiuj taŭgaj rimedoj;

(*d*) Faru instruadan kaj metian informaĵon kaj gvidadon havebla kaj alirebla de ĉiuj infanoj;

(*e*) Uzu rimedojn por stimuli regulan vizitadon al lernejoj kaj malplioftecon de tro frua elernejiĝo.

2. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn rimedojn por certigi, ke lerneja disciplino estu administrata en maniero konforma al la homa digno de la infano kaj al ĉi tiu konvencio.

3. Ŝtatoj Partioj antaŭenigu kaj stimulu internacian kunlaboradon en aferoj rilatantaj al instruado, precipe por kontribui al la forigo de nescio kaj analfabeteco tra la mondo kaj por faciligi aliron al scienca kaj teknika scio kaj modernaj instruadaj metodoj. Tiurilate oni speciale priatentu la bezonojn de evoluantaj landoj.

Artikolo 29

1. Ŝtatoj Partioj konsentas, ke la edukado de la infano celu:

(*a*) La evoluigon de la personeco, talentoj kaj mensaj kaj fizikaj kapablecoj de la infano ĝis ilia plej plena ebleco;

(*b*) La evoluigon de respekto al homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj, kaj al la sanktaj principoj entenataj en la Ĉarto de Unuiĝintaj Nacioj;

(*c*) La evoluigon de respekto al la gepatroj de la infano, ĝia kultura identeco, lingvo kaj valoroj, al la naciaj valoroj de la lando en kiu la infano loĝas, la lando en kiu ĝi originis, kaj al civilizacioj malsimilaj al ĝia propra;

(*d*) La preparadon de la infano por

respondeca vivo en libera socio, en la spirito de kompreno, paco, toleremo, egaleco de la seksoj, kaj amikeco inter ĉiuj popoloj, etnaj, naciaj kaj religiaj grupoj kaj personoj de indiĝena origino;

(*e*) La evoluigon de respekto al la natura medio.

2. Neniu parto de la nuna artikolo aŭ de artikolo 28 estu interpretata por malhelpi la liberecon de individuoj kaj organizoj starigi kaj administri instruajn instituciojn, kondiĉe ĉiam ke [illegible]i observu la principojn formulitajn en paragrafo 1-a de ĉi tiu artikolo kaj ke la instruado donita en tiaj institucioj konformu al eventualaj minimumaj normoj deciditaj de la Ŝtato.

Artikolo 30

En tiuj Ŝtatoj, en kiuj ekzistas etnaj, religiaj aŭ lingvaj minoritatoj aŭ estas personoj de indiĝena origino, infano kiu apartenas al tia minoritato, aŭ kiu estas indiĝena ne estu senigita disde la rajto, komune kun aliaj membroj de sia grupo, ĝui sian kulturon, deklari kaj praktiki sian propran religion, aŭ uzi sian propran lingvon.

Artikolo 31

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de la infano al ripozo kaj libera tempo, partopreni en ludado kaj distra agado taŭga al la aĝo de la infano kaj partopreni libere en kultura vivo kaj la artoj.

2. Ŝtatoj Partioj respektu kaj antaŭenigu la rajton de la infano partopreni plene en arta kaj kultura vivo kaj stimulu la provizon de taŭgaj kaj egalaj okazoj por kultura, arta, distra kaj libertempa agado.

Artikolo 32

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de la infano esti protektata kontraŭ ekonomia fiekspluatado kaj kontraŭ la plenumo de kiu ajn laboro kiu verŝajne estos danĝera aŭ malhelpos la instruadon de la infano, aŭ estos malutila al la sano, aŭ fizika, mensa, spirita, morala aŭ socia evoluo de la infano.

2. Ŝtatoj Partioj uzu leĝfarajn, administrajn, sociajn kaj klerigajn rimedojn por certigi la plenumadon de ĉi tiu artikolo. Tiucele, kaj prikonsiderante la rilatajn provizojn de aliaj internaciaj dokumentoj, Ŝtataj Partoj precipe:

(*a*) Preskribu minimuman aĝon por ekdungiĝo

(*b*) Preskribu taŭgan reguladon de la laborhoroj kaj kondiĉoj de dungado

(*c*) Preskribu taŭgajn punojn aŭ aliajn sankciojn por certigi la efikan devigan plenumadon de la nuna artikolo.

Artikolo 33

Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn rimedojn, inkluzive leĝfarajn, administrajn, sociajn kaj klerigajn, por protekti infanojn kontraŭ la kontraŭjura uzado de narkotaj drogoj kaj psikotropaj substancoj kiel difinitaj en la rilataj internaciaj traktatoj, kaj por preventi la uzadon de infanoj en la kontraŭleĝa produktado kaj fikomerco de tiaj substancoj.

Artikolo 34

Ŝtatoj Partioj sin devigas protekti la infanon kontraŭ ĉiuj formoj de seksa fiekspluatado kaj seksa fitraktado. Tiucele, Ŝtatoj Partioj precipe uzu ĉiujn taŭgajn naciajn,

duflankajn kaj multflankajn rimedojn por preventi:

(*a*) La persvadon aŭ premdevigon de infano partopreni en kiu ajn kontraŭleĝa seksagado;

(*b*) La fiekspluatan uzadon de infanoj en prostituado aŭ aliaj kontraŭleĝaj seksaj praktikoj;

(*c*) La fiekspluatan uzadon de infanoj en pornografiaj rolludoj kaj materialoj.

Artikolo 35

Ŝtataj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn naciajn, duflankajn kaj multflankajn rimedojn por preventi la forrabon de, la vendon de aŭ fikomerco pri infanoj, por kiu ajn celo aŭ en kiu ajn formo.

Artikolo 36

Ŝtatoj Partioj protektu la infanon kontraŭ ĉiuj aliaj formoj de fiekspluatado malutilaj al kiu ajn aspekto de la bonfarto de la infano.

Artikolo 37

Ŝtatoj Partioj certigu, ke:

(*a*) Neniu infano estu subigata al torturo aŭ alia kruela, nehoma aŭ sendigniga traktado aŭ puno. Nek mortpuno nek dumviva enkarcerigo sen ebleco de liberigo estu surmetita pro ofendoj faritaj de personoj aĝaj malpli ol dek ok jarojn;

(*b*) Neniu infano estu senigita de sia libereco kontraŭleĝe aŭ arbitre. La aresto, deteno aŭ enkarcerigo de infano estu konforma al la juro kaj estu uzata nur kiel rimedo de lasta aliro kaj por la plej mallonga taŭga periodo;

(*c*) Ĉiu infano senigita disde libereco estu traktata humane kaj respekteme al la laŭnatura digneco de la homa persono, kaj laŭ maniero kiu priatentas la bezonojn de personoj de ĝia aĝo. Precipe, ĉiu infano senigita disde libereco estu apartigita disde adoltoj krom se estas konsiderate, ke ne tion fari estus en la plej bonaj interesoj de la infano, kaj havu la rajton daŭrigi kontaktojn kun sia familio per korespondado aŭ vizitoj, krom se estas esceptaj cirkonstancoj;

(*d*) Ĉiu infano senigita disde sia libereco havu la rajton al tuja aliro al jura kaj alia taŭga helpo, same kiel la rajton disputi la laŭjurecon de tiu senigo de libereco antaŭ tribunalo aŭ alia kompenta, sendependa kaj senpartia instanco, kaj ricevi rapidan decidon pri tia proceso.

Artikolo 38

1. Ŝtatoj Partioj sin devigas respekti kaj certigi respekton al reguloj de internacia humana juro aplikebla al ili en armitaj konfliktoj kaj kiuj rilatas al la infano.

2. Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn eblajn rimedojn por certigi, ke personoj kiuj ne atingis la aĝon de dek kvin jaroj ne rekte partoprenu en militado.

3. Ŝtatoj Partioj sin detenu de la rekruto en siajn armfortojn de persono kiu ne atingis la aĝon de dek kvin jaroj. Rekrutante inter tiuj, kiuj atingis la aĝon de dek kvin jaroj sed kiuj ne atingis la aĝon de dek ok jaroj, Ŝtatoj Partioj klopodu doni antaŭecon al la plej aĝaj.

4. Konforme al siaj devoj laŭ internacia humana juro protekti la civilan loĝantaron en armitaj konfliktoj, Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn eblajn rimedojn certigi protektadon kaj prizorgon de infanoj tuŝitaj de

iu armita konflikto.

Artikolo 39

Ŝtatoj Partioj uzu ĉiujn taŭgajn rimedojn por antaŭenigi fizikan resaniĝon kaj socian reintegriĝon de infano viktimo de kiu ajn formo de neglekto, fiekspluatado, aŭ misuzo; torturo aŭ kiu ajn alia formo de kruela, nehoma aŭ sendigniga traktado aŭ puno aŭ armitaj konfliktoj. Tia resaniĝo kaj reintegriĝo okazu en medio kiu nutras la sanon, sinestimon kaj dignon de la infano.

Artikolo 40

1. Ŝtatoj Partioj agnoskas la rajton de ĉiu infano asertita, akuzita aŭ agnoskita esti malobservinta la kriminalan juron, esti traktata laŭ maniero konforma al la antaŭenigo de la sinestimo kaj digno, kiu plifortigas la respekton de la infano por homaj rajtoj kaj fundamentaj liberecoj de aliaj, kaj kiu prenas en konsideron la aĝon de la infano kaj la dezirindecon antaŭenigi la reintegriĝon de la infano kaj la akcepton fare de la infano de konstrua rolo en la socio.

2. Tiucele, kaj atentante la rilatajn preskribojn de internaciaj dokumentoj, Ŝtatoj Partioj certigu, precipe, ke:

(*a*) Neniu infano estu asertita, akuzita, aŭ agnoskita kiel estinta malobservinta la kriminalan juron pro agoj aŭ preterlasoj kiuj ne estis malpermesitaj laŭ nacia aŭ internacia juro je la tempo, kiam ĝi faris ilin;

(*b*) Ĉiu infano, asertita kiel aŭ akuzita estinta malobservinta la kriminalan juron, havu almenaŭ la sekvantajn garantiojn:

(i) Esti supozata senkulpa ĝis pruvita kulpa laŭ la juro;

(ii) Esti informita senprokraste kaj rekte pri la akuzoj kontraŭ ĝi, kaj se taŭgas per siaj gepatroj aŭ kuratoroj, kaj havi juran aŭ alian taŭgan helpon preparante kaj prezentante sian defendon;

(iii) Havi la aferon decidita senprokraste per kompetenta, sendependa kaj senpartia instanco aŭ juĝa aŭtoritato en justa proceso laŭ la juro, dum ĉeestas helpantoj pri juraj kaj aliaj aferoj kaj, krom se estas konsiderate ne esti en la plej bonaj interesoj de la infano, precipe priatentante ĝian aĝon aŭ situacion, ĝiaj gepatroj aŭ kuratoroj;

(iv) Ne esti devigita atesti aŭ konfesi kulpon; pridemandi aŭ pridemandigi kontraŭajn atestantojn kaj akiri la partoprenadon kaj pridemandadon de atestantoj favoraj al ĝi sub egalaj kondiĉoj;

(v) Se juĝata esti malobservinta la kriminalan juron, havi tiun juĝon kaj ĉiujn paŝojn konsekvence faritajn rekonsiderataj de pli alta kompetenta, sendependa kaj senpartia instanco aŭ tribunalo laŭ la juro;

(vi) Havi la senpagan helpon de interpretisto se la infano ne povas kompreni aŭ paroli la lingvon uzatan;

(vi) Havi sian privatecon plene respektata je ĉiuj stadioj de la proceduro.

3. Ŝtatoj Partioj penu antaŭenigi la starigon de leĝoj, proceduron, instancojn kaj instituciojn specife aplikeblajn al infanoj asertitaj, akuzitaj aŭ agnoskitaj esti malobservintaj la kriminalan juron, kaj precipe:

(*a*) La starigon de minimuma aĝo sub kiu infanoj estu supozataj ne havi la kapablon malobservi la

A BABY LEARNS TO SPEAK

(This article originally appeared in Portugal in March 1994.)



In this article I will tell a bit about the Esperanto education of Sara, my 21 month old daughter. First I must confess that I am not a fanatic about teaching children to speak Esperanto as their native language. Since I freely and personally chose to learn Esperanto for myself, I am not interested in forcing it on others, whether by decree or in education. However, for other reasons I realized that I have to inoculate my child with some language. If I must inoculate, why not with Esperanto? After much hesitation, which continued almost up to the expected time of birth, I told my wife about this and she fully agreed. By then I had already begun to talk in Esperanto to the bundle in her tummy with the goal of accustoming both the child and mother...

At this point I should say that I chose as my method not to have a method. I also did not join any association or group of parents with similar goals, since the mentors in such groups are mostly a sort of fundamentalists in respect to our language. So everything is proceeding naturally and without difficulty, freely and playfully, capriciously and full of spirit. The languages in use are defined by the situation and circumstances. When it is purely our threesome at home, I always speak to my child in Esperanto, using as large a vocabulary as possible and expressions which are as juicy as possible. If other family members or outsiders are present I mostly use Portuguese in order to prevent misunderstanding and embarrassment. I must admit though that I do feel under pressure when I have to speak Portuguese with Sara...The same feeling floods over me when I speak to my wife in Esperanto!

At her present age Sara has equal mastery of both languages. She began to speak in Portuguese at about ten months. At first she said *ábua* (for *água* meaning *water*), then the classical *pai* (*father*) and *mãe* (*mother*). The first Esperanto "influence" appeared a few months later, when she began to use the Esperanto plural with Portuguese words. For example *papa* (*porridge*) became *papai* (pronounced *pahp-eye*)! However she has hardly any traces left of this now. There then followed a reversed influence when she decided to apply to Esperanto words the vowel duplication familiar in Portuguese baby talk such as *popó* (*car*), *memé* (*sheep*) etc. Thus we got *pepé* for *papero* (*paper*) and *kaká* for *kato* (*cat*) and *kaco* (*penis*). Incidentally, she

though she also understands the word *piĉineto* (*tiny vulva*)...Sometimes she amusingly confuses Esperanto words which sound alike. For instance I remember that once she pointed to her eyes when asked about her uncle (*okulo/onklo*), and only a while ago she rubbed her eyebrows when I asked about cows! (*brovoj, bovoj*).

At her present age she completely and correctly pronounces only four Esperanto words, *mi, mia, ne, kaj* (*me, my, no, and*). She uses *kaj* abundantly and redundantly, sometimes by pure whim and fast as a machine gun, sometimes to supplement my sleepy-time babbling when I pause to think, but mostly...as a name for herself when someone questioningly points to her or to her photo! This usage which has all the family pondering I am inclined to interpret in this way: Often when I ask her a question I say to her *kaj Sara?* or *kaj vi?* (*and Sara?/and you?*). She is not yet able to make the sounds sh and s (for example, *sapo* [*soap*] becomes *pa* instead of the *sa* which might be expected; and from *ŝuo* [shoe] she made *ku*]. So she took the easier and evocative little word to be her own name, and regularly uses it for that purpose. This is another confirmation of the evocativeness and contagiousness of this ancient Greek word which also pushes its way into my speech when I have to speak English...

Sara also uses a number of single syllables which show traces of Esperanto although sometimes contamination from Portuguese words with the same meaning cannot be discounted. Usually it is just the accented syllable, often distorted. So we have her multifunctional *po* (*supo* [*soup*], *pomo* [*apple*], siropo [*syrup*], *pano* [*bread*], *terpomo* [*potato*], *ĉapo* [*cap*], *ombrelo* [*umbrella*]!; *ku* (*okulo* [*eye*]); *ko(forko* [*fork*]); *ka* (*kalsono* [*knickers*]); *mo* (*maro, mano* [*sea, hand*]); *pu* (*tuko* [*towel*]); *ro* (*horloĝo* [clock]); *pi* (*pilko, pli, birdo* [*ball, more, bird*]); *kro* (*karoto* [*carrot*]); *gro* (*jogurto* [*yoghurt*]), *bi* [*biskvito* [*biscuit*]); *ne* (*nazo* [*nose*]; *bu* (*buŝo* [mouth]); among others...A real phoenix version of Volapük! I should also mention some multisyllable words—*titi* (*ĉi tie* [*here*]), *naná* (*banano* [banana]) and others—and the hybrid word *pia* which came from Esperanto *piro* (*pear*) and the Portuguese equivalent *pêra*. Rather surprisingly she no longer uses the first two Esperanto words she learned: *tri* (*three*) and *ĵi* (for *ĝis* [*bye*]).

Another important aspect of multilingual education concerns the use of different forms for the same concept. Sara has already entered this stage. She first showed this ability at about 17 months when she used the word *pi* [from Esperanto *pilko*] to name her little ball, although she already was using—and still uses—the single syllable *bo* (from the Portuguese *bola*) for the same object. Later she began to use simultaneously the words *pi* and *mai* (from

ject. Later she began to use simultaneously the words *pi* and *mai* (from Portuguese *mais*) to say *more* [Esperanto *pli*]. Very useful ammunition when it is mealtime or playtime! She uses both words interchangeably and about equally often regardless of whether she is speaking to daddy or mum, since she is not yet aware that two "languages" are involved. However, when she says *mai* to me I pretend not to understand and ask *kion?* [*what?*] or move my lips as if to say *pli*. Then she immediately cries out *pi!*, and I react by giving her more food or continue our playing. She applies the useful word *ne!* in nearly the same way alongside the Portuguese *não!*. She has just used *bi* to say *biskvito* [*biscuit*] after long and painful exercise—she has always resisted my "lessons" and only used *abu* (from Portuguese *a bolacha*)! Now she uses both forms, but somewhat differently from *mai* and *pi*. Actually, for several months she only used the Portuguese form, and so she always prefers to use it as her first shot. However, if there is no response on my part and the desired biscuit does not come, then she watches my lips and yells out *bi!* In conclusion, when she knows two forms, she only uses the Esperanto in cases of real need! This is a purely utilitarian concept of language, just as respectable as any idealistic concept.

The future evolution of Kaj's—excuse me! Sara's—knowledge of Esperanto depends mainly on whether I will continue to be able to devote daily bits of time to her education, or whether that will be suffocated by family circumstances, change of my working conditions and hours, or the constant pressure of the Portuguese environment which at present only features in the family and baby care centre but later will feature at school, among friends, in adolescence, lovemaking, the turbulence of life...Can Esperanto hold out against the competition?

By Salnevo

Translated by Donald Broadribb from "ekaj bebaj pepoj" in *Nia Bulteno* #63 of the Portuguese Esperanto Association, January-March 1994.

Did you know that—

during the International Conference on the History of Esperanto, last September 24-27, a Bielorussian Esperanto Museum was established as part of the City Museum of History in Grodno, Bielorussia?

in Japan the first issue of *Riveroj*, an "intercultural revue" in Esperanto, was published late last year? Editor of *Riveroj* is Mine Yositaka, who can be contacted at Kitahama-Kitawaka 29-16, Takasago-si, Hyogo-Ken, 671-01,

AUSTRALIAN CHILDREN'S PERPETUAL FUND FOR ESPERANTO EDUCATION AND TRAVEL

Dear Editor and Readers,

Your contribution will help our future generation. The fund for the Esperanto education of Australian children is growing rapidly thanks to you all. The sum collected so far is $10 500.

We must lobby our ministers of education to introduce Esperanto into the elementary schools. But when they do eventually agree, where will they find enough qualified Esperanto teachers in our country?

Our government is at present emphasizing the importance of increasing relations between China and Australia. We know that in China qualified teachers of Esperanto are being trained. We therefore propose that the ultimate goal of our foundation be to collect money to enable qualified teachers of Esperanto to come to Australia. But for that purpose our fund must expand a very great deal.

Please help!...and hope! We will succeed!

Please send cheques to Jana Bogoyev, Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto education and Travel, 73 Newry Street, Floreat WA 6014, Australia.

Idyss Einihovici
Jana Bogoyev

Donations have been gratefully received from the following people so far:

Mrs Einihovici, Mrs Raiter, Mrs Parker, Mr Raiter, Mr Murray, Mrs Segal, Mr & Mrs Gubbay, Mr Berinson, Mr & Mrs Caddy, Mrs McCashney, Dr K. Currie, Mr Silbert, Dr Chambers, Mrs Bishop, Y. Bogoyev, Prof. A. Bishop, Mrs Madden, Dr Harry, Mr Scott, Mrs Maddern, Mr Mazza, Mr Lane, Mr Wagland, Dr Kowal, Mrs Warr, Mr Pasquini, Mr & Mrs Anderson, Mr Trevor Steele, Mrs Green, Dr Turnbull.

Editor's note:

Prof. Alan Bishop, of Monash University in Melbourne, is at present preparing a pilot project to study the results of the study of Esperanto by school children in improving and accelerating the subsequent study of Asian languages. Previous studies have already proven that the study of Esperanto greatly increases the ability of children to learn European languages. Controlled studies of children studying Asian languages with and without previous study of Esperanto are greatly desirable in order to present a case to the state ministries of education to introduce Esperanto as a regular subject in our schools.

I therefore suggest that the first goal of the new Foundation be to help fund and support Prof. Bishop's project.

The Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto Education and Travel is a private Foundation, independent of the Australian Esperanto Association. Its curators are J. M. Berinson Q.C., one-time Attorney General of Western Australia; Dr I. Raiter, opthalmologist; and Luke George, Grad. Dip. Bus. Man.

kriminalan juron;

(*b*) Kiam konvene kaj dezirinde, rimedojn por pritrakti tiajn infanojn sen aliro al juĝaj procesoj, kondiĉe ke homaj rajtoj kaj juraj garantioj estas plene respektataj.

4. Diversaj preskriboj, ekzemple prizorgado, gvidada kaj kontrola mandatoj; konsilado, kontrolata libereco; kromfamilia prizorgado; programoj de klerigado kaj metia instruado kaj aliaj alternativoj al institucia prizorgado estu haveblaj por certigi, ke infanoj estu traktataj en maniero taŭga al ilia bonfarto kaj proporcia kaj al iliaj cirkonstancoj kaj al la krimo.

Artikolo 41

Nenio en ĉi tiu Konvencio tuŝos kiujn ajn preskribojn kiuj estas pli efikaj al la plenumigo de la rajtoj de la infano kaj kiuj estas enhavataj en:

(*a*) La juro de Ŝtato Partio; aŭ

(*b*) Internacia juro kiu validas en tiu Ŝtato.

PARTO II

Artikolo 42

Ŝtatoj Partioj sin devigas diskonigi la principojn kaj preskribojn de la Konvencio, per taŭgaj kaj aktivaj rimedoj, al adoltoj kaj same al infanoj.

Artikolo 43

1. Por ekzameni la progreson faritan de Ŝtatoj Partioj atingante la efektivigon de la sindevigoj akceptitaj en ĉi tiu Konvencio, estu starigita Komitato pri la Rajtoj de la Infano, kiu plenumu la funkciojn ĉi poste preskribitajn.

2. La Komitato konsistos el dek spertuloj de alta morala reputacio kaj agnoskita kompetenteco sur la kampo ampleksata de ĉi tiu Konvencio. La membroj de la Komitato estu elektitaj de Ŝtatoj Partioj el inter siaj ŝtatanoj kaj servu persone, priatentante justan geografian distribuon kaj ankaŭ la ĉefajn jursistemojn.

3. La membroj de la Komitato estu elektitaj per sekreta baloto el listo de personoj proponitaj de Ŝtatoj Partioj. Ĉiu Ŝtato Partio rajtas proponi unu personon el inter siaj ŝtatanoj.

4. La unua elekto al la Komitato estu okazigita ne pli malfrue ol ses monatojn post la dato kiam ekvalidos ĉi tiu Konvencio kaj post tio ĉiun duan jaron. Almenaŭ kvar monatojn antaŭ la dato de ĉiu elekto, la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj sendu leteron al Ŝtatoj Partioj invitante ilin submeti siajn proponojn antaŭ la fino de du monatoj. La Ĝenerala Sekretario poste preparos liston laŭ alfabeta ordo de ĉiuj personoj tiel proponitaj, kaj submetos ĝin al la Ŝtatoj Partioj de ĉi tiu Konvencio.

5. La elektoj estu okazigitaj en kunvenoj de Ŝtatoj Partioj kunvokitaj de la Ĝenerala Sekretario en la Ĉefejo de Unuiĝintaj Nacioj. En tiuj kunvenoj, por kiuj du trionoj de Ŝtatoj Partioj estu kvorumo, la personoj elektitaj al la Komitato estos tiuj kiuj ricevas la plej grandan nombron da voĉdonoj kaj absolutan plimulton de la voĉdonoj de la reprezentantoj de la Ŝtatoj ĉeestantaj kaj voĉdonantaj.

6. La membroj de la Komitato estu elektitaj por periodo de kvar jaroj. Ili estu reelekteblaj se ili estas reproponitaj. La periodo de kvin

el la membroj elektitaj en la unua elekto finiĝos je la fino de du jaroj; tuj post la unua elekto la nomoj de tiuj kvin membroj estu elektitaj lote fare de la Prezidanto de la kunveno.

7. Se membro de la Komitato mortos aŭ demisios aŭ deklaros, ke pro kiu ajn alia kaŭzo li/ŝi ne povas plu plenumi la devojn de la Komitato, la Ŝtato Partio kiu proponis tiun membron nomu alian spertulon el siaj ŝtatanoj por servi dum la resto de la periodo, kondiĉe, ke la Komitato aprobu.

8. La Komitato starigos sian propran proceduran regularon.

9. La Komitato elektos siajn oficistojn por dujara periodo.

10. La kunvenoj de la Komitato normale okazu en la Ĉefejo de Unuiĝintaj Nacioj aŭ en kiu ajn alia konvena loko laŭ la decido de la Komitato. La Komitato normale kunvenu ĉiujare. La daŭro de la kunvenoj de la Komitato estu decidita, kaj reviziita se necese, fare de kunveno de la Ŝtatoj Partioj de ĉi tiu Konvencio, kondiĉe je la aprobo de la Ĝenerala Asembleo.

11. La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj provizu la necesan stabon kaj rimedojn por la efika plenumo de la funkcioj de la Komitato laŭ la nuna Konvencio.

12. Kun aprobo de la Ĝenerala Asembleo, la membroj de la Komitato starigita laŭ ĉi tiu Konvencio ricevu honorarion el resursoj de Unuiĝintaj Nacioj laŭ reguloj kaj kondiĉoj eventuale deciditaj de la Asembleo.

Artikolo 44

1. Ŝtatoj Partioj sin devigas submeti al la Komitato, pere de la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, raportojn pri la rimedoj kiujn ili uzis por efektivigi la rajtojn agnoskitajn en ĉi tiu Konvencio kaj pri la progreso farita rilate la ĝuadon de tiuj rajtoj:

(*a*) Antaŭ la fino de du jaroj post la ekvalido de la Konvencio rilate la koncernatan Ŝtaton Partion.

(*b*) Poste ĉiun kvinan jaron.

2. Raportoj faritaj laŭ la nuna artikolo indiku eventualajn faktorojn kaj malfacilaĵojn, kiuj tuŝas la gradon de plenumo de la devoj laŭ ĉi tiu Konvencio. Raportoj ankaŭ enhavu sufiĉe da informaĵo por havigi al la Komitato ampleksan komprenon de la plenumado de la Konvencio en la koncerna lando.

3. Ŝtato Partio kiu submetis ampleksan unuan raporton al la Komitato ne devos, en siaj postaj raportoj submetitaj laŭ paragrafo 1(b) de la nuna artikolo, ripeti bazan informaĵon jam provizitan.

4. La Komitato rajtas peti de Ŝtatoj Partioj pluan informaĵon rilatantan al la plenumo de la Konvencio.

5. La Komitato submetu al la Ĝenerala Asembleo, pere de la Ekonomia kaj Socia Konsilio, ĉiun duan jaron, raportojn pri sia agado.

6. Ŝtatoj Partioj faru siajn raportojn dise haveblaj al la publiko en siaj propraj landoj.

Artikolo 45

Por stimuli la efikan plenumadon de la Konvencio kaj por antaŭenigi internacian kunlaboradon sur la kampo ampleksita en la Konvencio:

(*a*) La specialigitaj institucioj, la Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj, kaj aliaj organoj de Unuiĝintaj Nacioj rajtu esti reprezentataj

ĉe la konsiderado de la plenumo de tiuj preskriboj de ĉi tiu Konvencio kiuj estas en la amplekso de sia mandato. La Komitato rajtas inviti la specialigitajn instituciojn, la Fonduson de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj kaj aliajn kompetentajn organizaĵojn, kiujn ĝi konsideras taŭgaj, provizi spertan konsilon pri la plenumo de la Konvencio rilate aspektojn, kiuj estas en la amplekso de iliaj respektivaj mandatoj. La Komitato rajtas inviti la specialigitajn instituciojn, la Fonduson de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj kaj aliajn organojn de Unuiĝintaj Nacioj submeti raportojn pri la plenumado de la Konvencio rilate aspektojn kiuj estas en la amplekso de ilia agado.

(*b*) La Komitato transdonu, kiel ĝi konsideras taŭge, al la specialigitaj institucioj, la Fonduso de Unuiĝintaj Nacioj por Infanoj kaj aliaj kompetentaj organizoj, eventualajn raportojn de Ŝtatoj Partioj, kiuj enhavas peton, aŭ indikas bezonon, de teknika konsilo aŭ helpo, kune kun eventualaj komentoj kaj sugestoj pri tiuj petoj aŭ indikoj;

(*c*) La Komitato rajtas rekomendi al la Ĝenerala Asembleo, ke ĝi petu al la Ĝenerala Sekretario entrepreni pro ĝi studojn pri specifaj demandoj rilate la rajtojn de la infano;

(*d*) La Komitato rajtas fari sugestojn kaj ĝeneralajn rekomendojn bazitajn sur informaĵo ricevita laŭ artikoloj 44 kaj 45 de la nuna Konvencio. Tiaj sugestoj kaj ĝeneralaj rekomendoj estu senditaj al kiu ajn koncernata Ŝtato Partio kaj raportitaj al la Ĝenerala Asembleo, kune kun eventualaj komentoj de Ŝtatoj Partioj.

PARTO III

Artikolo 46

Ĉi tiu Konvencio estu aperta por subskribo de ĉiu Ŝtato.

Artikolo 47

Ĉi tiu Konvencio estas ratifenda. Ratifiloj devas esti deponitaj ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 48

Ĉi tiu Konvencio restu aperta por posta aliĝo de kiu ajn Ŝtato. La aliĝiloj estu deponitaj ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

Artikolo 49

1. Ĉi tiu Konvencio ekvalidos la tridekan tagon post la depono ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj de la dudeka ratifilo aŭ aliĝilo.

2. Rilate ĉiun Ŝtaton kiu ratifas la Konvencion aŭ aliĝos post la depono de la dudeka ratifilo aŭ aliĝilo, la Konvencio ekvalidos la tridekan tagon post la depono fare de tia Ŝtato de sia ratifilo aŭ aliĝilo.

Artikolo 50

1. Kiu ajn Ŝtato Partio rajtas proponi amendon kaj registri ĝin ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. La Ĝenerala Sekretario tuj transsendu la proponatan amendon al Ŝtatoj Partioj, kun peto, ke ili indiku ĉu ili subtenas konferencon de Ŝtatoj Partioj por konsideri kaj privoĉdoni la proponojn. Se, antaŭ la fino de kvar monatoj ekde la dato de tia transsendo, almenaŭ triono

de la Ŝtatoj Partioj subtenas tian konferencon, la Ĝenerala Sekretario kunvoku la konferencon sub la aŭspicioj de Unuiĝintaj Nacioj. Ĉiu amendo akceptita de plimulto de la Ŝtatoj Partioj, kiuj ĉeestas kaj voĉdonas en la konferenco estu submetitaj al la Ĝenerala Asembleo por aprobo.

2. Amendo akceptita laŭ paragrafo 1 de la nuna artikolo ekvalidu kiam ĝi estas aprobita de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj kaj akceptita de plimulto de du trionoj de Ŝtatoj Partioj.

3. Kiam amendo ekvalidas ĝi estu deviga por tiuj Ŝtatoj Partioj kiuj akceptis ĝin. Aliaj Ŝtatoj Partioj restos devigitaj de la preskriboj de la nuna Konvencio kaj eventuale de pli fruaj amendoj, kiujn ili jam akceptis.

Artikolo 51

1. La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj ricevu kaj dissendu al ĉiuj Ŝtatoj la tekston de rezervoj faritaj de Ŝtatoj je la tempo de ratifo aŭ aliĝo.

2. Rezervo ne akordigebla al la intenco kaj celo de la nuna Konvencio ne estos permesata.

3. Rezervoj povas esti retiritaj kiam ajn per tiucelaj informoj senditaj al la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj, kiu tiam informu ĉiujn Ŝtatojn. Tia informo ekvalidos je la dato kiam ĝi estas ricevita de la Ĝenerala Sekretario.

Artikolo 52

Ŝtato Partio rajtas denunci ĉi tiun Konvencion per skribita informo al la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj. Denunco ekvalidas unu jaron post la dato kiam ĝin ricevis la Ĝenerala Sekretario.

Artikolo 53

La Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj estas nomita la deponricevanto de ĉi tiu Konvencio.

Artikolo 54

La originalo de ĉi tiu Konvencio, kies araba, ĉina, angla, franca, rusa kaj hispana tekstoj estas egale aŭtentikaj, estu deponita ĉe la Ĝenerala Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj.

KIEL ATESTO la subskribintaj plenrajtigitoj, tiucele rajtigitaj de siaj respektivaj Registaroj, subskribis ĉi tiun Konvencion.

1989

ALDONU AL LA LIBROKATALOGO 1994

391. *Kanto pri Minotaŭro kaj aliaj poemoj* de Gerrit Berveling. 135p. $23.30

444. *Balado de Prizono Reding/Ballad of Reading Gaol* de Oscar Wilde, tr. Leopoldo H. Knoedt. 75p. $10.90.

Rikolto—Juan Régulo Pérez, red. Gaston Waringhien & Richard Haupenthal. 596p. $59.40.

Ludo: *Miksu.* Sur IBM-komputilaj diskoj (3½-colaj-diskoj). $4.00. (Vidu anoncon sur p. 24 de ĉi tiu numero.

Mendu de la Libroservo de AEA: PO Box 230, Matraville NSW 2036, Aŭstralio. Ne sendu pagon kun la mendo. Fakturo akompanos la libron.

LINGVA ANGULO
de ALAN TOWSEY

Nian gramatikan diskuton en ĉi tiu numero ni ŝuldas al D-ro Ralph Harry, kiu bazis ĝin sur prelegeto farita laŭ peto de la Manlia Klubo.

ASPEKTOJ DE LA INFINITIVO

Laŭ *Plena Analiza Gramatiko* la infinitivo estas "esence transira formo inter la verbo kaj la substantivo. Al la verbo ĝi similas per tio, ke ĝi povas havi la samajn komplementojn kiel la verbo, sed ĝi malsimilas per tio, ke ĝi ne postulas al si propran subjekton,...kaj ke ĝi posedas unu solan formon, kiu servas do por ĉiuj tempoj kaj modoj...ĝi similas al la substantivo per tio, ke ĝi povas plenumi la samajn sintaks-funkciojn (subjekto, objekto, predikativo, adjekto), sed ĝi malsimilas per tio, ke ĝi ne povas esti akompanata de certaj determinantoj (artikolo, adjektivo, prepozicio—krom kelkaj...)."

Ĉi tiu noto ekzamenas la cirkonstancojn, kiam oni povas uzi inifinitivon senpere post verbo aŭ adjektivo, kaj kiam oni kutime enmetas la prepozicion "por".

Sep Krimnoveloj de Ronald Cecil Gates finiĝas per la vortoj: "Mi tuj iros informi la makleriston". Kial la aŭtoro ne diris: "iros por informi"?

Post kelkaj verboj (la modaj helpverboj—*PAG* 116d) kaj rilataj substantivoj kaj adjektivoj oni nepre uzas infinitivon sen "por", ekzemple: povas, kapablas, volas, devas, ŝatas, amas.

homoj povas fari
mi neniel povas kompreni
mi ne povas legi tiun libron
mi kapablas fari nenion
ŝi kapablas kuiri
li havas la kapablon esprimi kaj publikigi sian penson
la kapablon tiri
la kapablon flugi
mi volas aŭdi la veron
mi volas partopreni
ni devas pagi
ili devas dormi
ŝtatano havas devon obei
homoj ŝatas ĉasi
geknaboj amas ludi

Jen kelkaj substantivoj pli-malpli parencsignifaj; oni uzas senperan infinitivon, ekzemple: la volo transvivi, la espero sukcesi—

avido, bezono, decido, devo, deziro, eblo, emo, espero, forto, intenco, inklino, ĵuro, klopodo, kompetento, laco, libereco, neceso, nepovado, okazo, oportuno, peno, preteco, promeso, povo, rajto, ŝanco, tasko, volo (vidu *PAG* 141)

Post verboj indikantaj deziron, celadon, emon oni kutime uzas senperan infinitivon:

mi deziras ripozi, legi, kuri
kiu bati deziras, trovas bastonon[1]
oni penas ŝtopi la fendon
ĉiuj penas eliri
ni strebu helpi
ni klopodas protekti ilin
mi intencas foriri, resti
la najtingalo intencis forflugi
ili avidis drinki
oni bezonas pripensi
ne estas bezono atendi
mi sopiras lerni, marŝi, kanti, ekvidi ŝin
li ambiciis havi postenon
mi brulas kisi ŝin
mi soifas spekti teatraĵon
mi pretas forgesi

Kelkfoje oni trovas **por** (*estas tempo por morti*) sed ĝi estas ellasebla. (*PAG* 117.4cc)

Post verbo pri movado al ia loko (ekzemple iri/direkti sin al ia celo) oni ofte uzas senpere infinitivon, kiam oni parolas pri la celo de la movado:

iri ĉerpi akvon[2]
iri dormi, gliti[2]
mi venos manĝi je la sepa
ne venu kritiki
fine venis la horo diri la tutan veron

Sed kelkfoje, kiam oni deziras substreki la fakton, ke la movado havas nur unu celon, oni aldonas "por":

ĉu mi venis tien ĉi por doni al vi trinki?
tiuj, kiuj venis por gustumi aroman trinkaĵon...[2]

N.B. La celon oni **ne** esprimas per participo (*mi venis faronte tion*), sed per infinitivo kun por: *mi venis por fari*. (*PAG* 118.2)

Notu: En la angla "to be going to do something" ofte signifas nur la futuron:

I am going to inform the agent—mi informos la makleriston, mi estas

---

[1]*Proverbaro Esperanta* #970.—Red.

[2]Ĉi tiu uzado sendube estiĝis pro la influo de pluraj eŭropaj lingvoj, en kiuj infinitivo normale estas ligata kun antaŭiranta verbo per prepozicio, kiu tamen kutime estas forlasata post verboj indikantaj movadon de ia loko al alia, krom se oni volas emfazi la *celon* de la movado; en tia okazo oni uzas la ekvivalenton de *por*.

Eĉ la angla foje faras simile:

Go jump in the lake! (Iru al la infero!)

La angla ofte uzas *and* en tiaj okazoj:

Come *and* see me tomorrow. (Venu paroli kun mi morgaŭ.)

Kaj por indiki la celon:

He came home (*in order*) *to* be with his sick mother. (Li venis hejmen *por* esti kun sia malsana patrino).

Sed **notu**: Come to think of it = Kiam mi pripensas tion...—A.T.

informonta la makleriston)
I'm going to tell your father—mi informos vian patron.

Oni uzas "iri" nur se temas pri moviĝo!

ŜATI

István Ertl has sent me the following extract from an article by Claude Piron titled "A few notes on the evolution of Esperanto".

1. *Semantic evolution*

A number of roots have experienced a shift in their semantic field. Here are three examples:

(a) In Zamenhof's usage (examples in Grosjean-Maupin et al. 1953:30), and still in Waringhien's dictionaries (*Plena ilustrita vortaro* 1970:36; Waringhien 1976:29), the usual way to express the idea "I like to sing" is *mi amas kanti*. Apparently, using the same word, as in Russian and French, to express a simple taste and a love feeling that may be extremely profound shocked a large part of the Esperanto community, which unconsciously reacted by differentiating the two concepts. Today *ami* covers only the semantic field of "to love", the concept "to like" being rendered by *ŝati*, which originally had a meaning closer to "to appreciate" (Zamenhof 1905:160)[1]. This example illustrates both the influence and the pliancy of the substratum. The differentiation was limited at first to a part of the "diapora" (on this term see Piron, elsewhere in this volume—ed.), but that part was the majority, and it eventually conquered even the speakers of Esperanto with French or Russian linguistic backgrounds, who gradually assimilated the distinction although it does not exist in their languages.

This may well be so. As I said in my "Lingva Angulo" in the March-April 1994 issue of *ESK*, *ŝati* is indeed already widely used in the sense of "like", although whether it is as universal as Piron claims I am not so sure. The danger here is that, since many Esperantists still use it in its original sense also, there will be some cases where its precise meaning will not be clear from the context—I have come across a couple such in my reading lately, but omitted to note them down at the time.


The new usage may, of course, eventually prevail, in which case the Akademio should *officialise* the change of meaning—though that would, of course, run contrary to the principle of the eternal "netuŝebleco" of the *Fundamento*. And even if the new meaning finally prevails, difficulties of interpretation would still arise with older literary (and other) texts.

Since the meaning of "like" can be easily and neatly expressed without *ami* or *ŝati* (from German *schätzen* "regard highly, value, appreciate; estimate")—by *plaĉi al* (Tio plaĉas al mi; *germane:* Das gefällt mir)—the shift in meaning is not necessary, and probably arose originally from ignorance or misinterpretation of the exact meaning.

In my opinion, therefore, it should be consistently resisted. We may yet save the day! →

[1]In the *Fundamento de Esperanto* Zamenhof translates the root *ŝati* as "esteem" and *malŝati* as "neglect".—ed. *ESK*

[I disagree. For those new to the argument, the "netuŝebleco" of the *Fundamento* refers to the *Fundamento de Esperanto*, a booklet adopted in 1905 as the basis of Esperanto. In its introduction it states that it may never be altered. However the statement goes on to explain what this unalterability ("netuŝebleco") means: *"Neniu persono kaj neniu societo devas havi la rajton* ***arbitre*** *fari en nia Fundamento iun eĉ plej malgrandan ŝanĝon."* (Emphasis mine.) Officialization of a change of meaning due to normal language evolution could hardly be called an "arbitrary change". The text goes on to specifically allow for such natural change, commenting that it may well be that some form "iom post iom forpuŝos la formon malnovan, kiu fariĝos *arĥaismo*, kiel ni tion ĉi vidas en ĉiu natura lingvo" and in such a case an authority established for such purposes "rekomendos uzadi [la novan formon] *paralele* kun la formo malnova." Thus, as in all languages, there will inevitably be a transition period in which both an archaic meaning and a newer but now common meaning may co-exist in the literature. It is true that theoretically some confusion could result, though I have personally never noted any. The Akademio de Esperanto is the body charged with the responsibility for officializing evolutionary developments that have taken place in the language. (For details, see my article "The Academy of Esperanto" in *Presenting Esperanto*, ed. Donald Broadibb, AEA 1992.) It is true that it has not formally made any statement regarding the meaning of the word *ŝati*, but it should be noted that Academy publications regularly use it in the sense of "to like".-Ed.] ❑



Adreso de la Korespondservo de AEA: Betty Aulsebrook, 51 Lakeview Crescent, Forster NSW 2428. Se vi deziras korespondi kun persono en la ĉisekva listo, vi povas havigi de nia Korespondservo ties originalan leteron.

Elena Demetkova, ul Kominterna 2-66, Aleksandrija, Kirovograndskaja, obl 317900, Ukrajno. 16-jara. Junulino tre religia. Deziras skribamikon.

Korós Tamás, Batmonostor, Vörösmartyu 20/b, 6528 Hungario. 15-jara. Komencanto. Deziras trovi aŭstralianon kiu ankaŭ scipovas la germanan lingvon.

Juan Manuel Alonso de Arcos, Alameda de Capuchinos 8.-5º-B, 29014 Malaga, Hispanio. Deziras interŝanĝi uzitajn poŝtmarkojn.

Polesuk Olga, Spartaka 16-90, Novosibirsk, 630007 Rusio. 24-jara studentino, interesiĝas pri lingvoj, astrologio, psikologio, moderna kaj klasika muziko.

Zuzanna Jeziorska, ul Biedronkowa 17/39, 91-358 Todz, Pollando. 40-jara. Interesiĝas pri fremdaj lingvoj, literaturo, jogo, muziko, meditado.

Leo Lokitan, Mackula sjk, EE 2840 Janvamaa, Estonio. 40-jara. Interesiĝas pri popolkutimoj, sportoj; kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn. Lernas Esperanton de kvin jaroj. Ankoraŭ ne havas skribamikon.

Luisa Menéndez, Domicilio Social, Casa de Cultura, Avilés, Hispanio. Interesiĝas pri religio.

Mario de los Ángeles, Caraballo Mauriz, Gonzalo de Quesada 74, Sagua la Grande, Villaclara, C P 52310, Kubo. Deziras skribamikon en Aŭstralio.

DIVERSAĴOJ

- ***La Domo. Jarcento 21.*** Trimonata revuo de la profesioj kaj de la servoj. Eldonata de la Tutmonda Asocio de Konstruistoj Esperantistoj (TAKE). Nun aperas. Utila por personoj laborantaj en aŭ interesataj de konstruindustrioj. Adreso: RN 83—Rue de Tiefenbach, 68 920 Wintzenheim (Colmar), Francio. Por abono, vidu la aboninformilon kiu akompanos la novembran numeron de *ESK*.
- ***Kolokvo de la Akademio de Esperanto*** okazos en Praha (Ĉeĥio) la 7-14an de julio pri la temo "La stato kaj estonteco de la internacia lingvo Esperanto". La prelegoj kaj diskutoj estas poste publikigotaj.




- La UK en Tampere, Finnlando, 22-29 julio 1995: aperis la Unua Bulteno. Laŭ la priskribado en la Finna Esperanta gazeto *Esperantolehti* oni rajtas anticipi elstaran kongreson en vere vizitinda lando kiun la plej multaj el ni ne konas. La kongreskotizoj, se oni pagos antaŭ la 31a de decembro 1994, estas:
  Por individua membro de UEA: AŬ$167
  Por neindividua membro de UEA: AŬ$210
  Por kunulo/junulo/handikapulo, ne individua membro de UEA: $AŬ126. (Se individua membro de UEA: AŬ$84.)
  Vi povas aliĝi per la Libroservo de AEA.

ESPERANTO-TV-KURSO

Diversaj Esperantaj grupoj en diversaj landoj laboradas por produkti internacie uzeblan TV-kurson pri Esperanto. Ĝis nun la problemoj montriĝis tre severaj. Mankas ne nur mono, sed kompetentaj profesiaj reĝisoroj kaj teknikistoj — kaj evidentiĝis grandega manko de kunlaborado inter la diverslandaj proponantoj.
Intertempe, la Internacia Esperanto-Instituto (IEI) strebas pretigi Esperantan version de jam ekzistanta instrukurso *Mazi en Gondolando* (adaptita el la BBC kurso *Muzzy From Gondoland*, kaj produktota en Pollando.) Oni esperas kompletigi la produkton en la mezo de 1995. Sed oni devos havi almenaŭ 800 antaŭpagitajn mendojn antaŭ la fino de 1994. La prezo de tia mendo estas US$50. Oni povas pagi en la konton de IEI ĉe UEA, konto iein-q, pere de la AEA Libroservo. Detalojn pri la projekto oni povas ricevi de la redaktoro de *ESK*.

Solvo de krucvorto



PRI AUSTRALIAN CHILDREN'S PERPETUAL FUND FOR ESPERANTO EDUCATION AND TRAVEL

Estimataj Redaktoro kaj legantoj,
Via kontribuo helpos al nia futura generacio! La fonduso por Aŭstraliaj infanoj kreskas rapide danke al vi ĉiuj (la sumo estas nun $10 500). Ni devas instigi niajn ministrojn de edukado ekonduki Esperanton en elementajn lernejojn. Sed kiam ili akceptos, kie troviĝos kvalifikitaj instruistoj de Esperanto en nia lando? Nia registaro nuntempe emfazas la gravecon de pliintensigo de rilatoj inter Ĉinio kaj Aŭstralio. Ni scias ke en Ĉinio oni trejnas kvalifikitajn instruistojn de Esperanto. Ni proponas do ke celo de nia fonduso estu kolektado de mono por ebligi la alvenigon de diplomita(j) ĉina(j) instruisto(j) de Esperanto. Por tiu celo nia fonduso devos multe, multe kreski.
Bonvolu helpi...kaj esperu! Ni nepre gajnos sukceson!
Bonvolu sendu ĉekojn al Jana Bogojev, Australian Children's Perpetual Fund for Esperanto Education and Travel, 73 Newry St, Floreat WA 6014, Aŭstralio.
Liston de ĝisnunaj donacintoj vi trovos en la angla suplemento.
Elkorajn salutojn,

Idyss Einihovici
Jana Bogojev

NOVA LUDO *MIKSU*

Por uzo per MS-DOS komputiloj
versio laŭ W.F. Pilger

Miksu celas ebligi, per utiligo de vorto- kaj esprimo-listoj faritaj per simpla tekstotraktado, diversmaniere ekzerci sin pri vorto-trezoro aŭ ortografio. Ĝi krome povas taŭgi por, en agrabla maniero, lerni novajn vortojn. Aliflanke ĝi estas utiligebla kiel iom pli inteligenta kaj instrua variaĵo de ludoj kiaj "pendumilo" aŭ "literkvino".
Du formoj de la ludo haveblas sur IBM-kongruaj 3½" diskoj:
MIKSU.BRE: Vocabulary training English-Esperanto (*Baza Radikaro Oficiala* kun anglaj tradukoj/komentoj, plus aliaj vorto-divenaj ludoj kaj ekzercoj).
MIKSU—PRO: Esperanta-Proverbaro (nur en Esperanto) plus aliaj vort-divenaj ludoj kaj ekzercoj.
La diskoj ĉefe taŭgas por kolorekranoj. Per EGA/VGA/SVGA-ekranoj eblas montri la Esperantajn supersignitajn literojn.
Kiu deziras, povas akiri neregistritan kopion, de la Libroservo de AEA je AŬ$4.00.



EL LA REGIONOJ

Nov-Zelando—*Wellington:* marta kunveno de la Esperanto-Rondo de Wellington: Bill Turner prezentis paroladon je temo bazita sur la novjara mesaĝo de la prezidanto de UEA John C. Wells, "Batali kontraŭ maljusto". Li aludis al la problemoj kiuj ekzistas kaj la ŝanĝoj, kaj la bonaj kaj la malbonaj, kiuj okazas dum ĉi tiu jarcento, kaj demandis ĉu Esperanto estas necesa, ĉu ĝi sukcesos. Konfesante ke eble la Esperantistoj kiuj fidas al la lingvo estas plejparte idealistoj, Bill samtempe memorigis nin pri la vortoj de Ivo Lapenna kiu, kiel multaj aliaj, pro la fakto ke la mondo malgrandiĝas kredis ke internacia lingvo devas alveni. Pensiga parolado.—Mary Richardson.

NOTOJ DE LA ĈEFDELEGITO

D-rino Gertrude Novak, prezidanto de la Esperanto-Societo de Chicago, vizitis Wellingtonon kaj tiuj Esperantistoj kiuj estis liberaj renkontis ŝin en mia hejmo la 12-an de aprilo. Gertrude informis nin ke la Chicago-klubo havas sesdek pagintajn membrojn kaj ili kunvenas ĉiumonate, dimanĉe. Inter la membroj estas S-ro R. Kent Jones, la nova edukada oficisto de ELNA.

Christopher Scott, komisiito de NZEA pri UN-aferoj kaj antaŭe la sekretario nun estas prezidanto de la Wellingtona filio de UNANZ. Gratulojn Chris.

Cindrulinoj: Fay Pedler ne estas Esperantisto sed filatelisto kiu nun estas specialisto pri Esperantaj cindrulinoj. Komence ŝi kolektis Esperantajn poŝtmarkojn sed nun ŝi trovas la kolektadon de Esperantaj cindrulinoj (angle *cinderellas*) pli interesa. Ŝi jam montris sian kolekton dufoje, unue en Auckland en 1991 kaj poste en regiona konkurso en Hawke Bay. Ŝi havis montraĵon dum la Nov-Zelanda Nacia Poŝtmarka Ekspozicio en Hamilton 13-15 de majo. *Cindrulino* laŭ aspekto estas poŝtmarko sed oni ne povas uzi ĝin por la ekspedo de leteroj sed oni povas ornami la kovertojn per ili kaj samtempe sed ne rekte propagandi Esperanton. Se vi hazarde povas eble provizi al ŝi specimenojn kiujn ŝi ne havas, bonvolu skribi rekte al ŝi: F. Pedler, Box 797, Wanganui, Nov-Zelando.

Pli liberaj rilatoj kun Koreo: Bona novaĵo por Nov-Zelandanoj kiuj intencas vojaĝi al Koreo estas ke post nova interkonsento oni ne plu bezonas vizon por vizitoj al Koreo kiuj daŭras ne pli ol tri monatojn.—Gwenda Sutton.

Aŭstralio—*Kvinslando:* Konferenco la 16/17an de marto. Pli ol 20 anoj ĉeestis la 44an konferencon de E.F.K. ĉe Caboolture, kampara urbo ĉ. 50 kilometrojn norde de Brisbano. Dum la Ĝenerala Kunveno anoj diskutis pri la okazonta Kon-

greso de AEA 1995. LKK elektiĝis kaj nuntempe serĉas la plej taŭgan ejon, plej probable ĉe la Ora Marbordo. Dimanĉe anoj vizitis grandan pulbazaron, kaj poste iris al la apuda "Historia Vilaĝo" kie entute 68 apartaj konstruaĵoj el la pasinteco bildigas iamajn vivkondiĉojn. Estraro de E.F.K.: Prezidanto Gaye Phillips; vicprezidanto Tom O'Grady; Sekretario Kay Andersen; Kasisto Marv Schramm; P.R.O. Peter Keates; redaktoro de *La Voĉo* Jay Grant. Komitatanoj: Sandra Connors, Annie Spencer, Connie White, Mark Wood.

La kutima jarpikniko de nia Federacio okazis la 5-an de junio en Maiala Parko, ĉe Mt Glorious ĉ. 50km nordokcidente de Brisbano en Ŝtatarbara Parko. La vojo serpentumis tra la boŝo flanke de la Valo Samford, kiun oni povis spekti el kelkaj taŭgaj elrigardejoj survoje. Post lunĉo preparita per subĉiela kradrostilo, anoj promenis laŭ vojetoj tra la belega boŝparko, admiris la eŭkaliptojn kaj aliajn arbojn, aŭskultis la sonojn de la vipbirdoj kaj sonorilbirdoj. Alte en la ĉielo super la apuda valo majeste flugis kojnvostaj agloj. Post multe da babilado kaj lasta taso da teo membroj forlasis la parkon kun kontentigaj memoroj pri la jarpikniko 1994-a.—Ray Ross.

Sudaŭstralio: La semajnfinon de la 30a de aprilo dekunu membroj de SAES kungrupiĝis ĉe Graham's Castle en Goolwa. Oni ekskursis al Granite Island por rigardi la fepingvenojn; al la Signal Point Muzeo; kaj en Goolwa. Peter Ellyard, eks-Komisionisto Por La Futuro (kaj nun konsilanto de tiu komisiono) gvidis diskuton pri la estonta UK en Adelajdo 1997. Ludoj, organizitaj de Barbara Bruer, kaj murdo* (aranĝita de geedukista paro) distris la partoprenantojn de la semajnfino. Entute: tre sukcesa kunveno.—laŭ *Tamen Plu*.
[*Murd-ludo, kompreneble.]

Nekrologo:

NELSON HILL

verkis David Ryan

Forpasis la 3-an de januaro Nelson Hill, elstara membro de la Wellingtona Esperanto-Rondo kaj membro de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio dum multaj jardekoj.

Nelson estis unu el la unuaj esperantistoj en Wellington kaj starigis Esperanto-klubon en la urbo—fakte, tie li ekkonis sian edzinon, Joyce. Dum multaj jaroj li instruis Esperanton al centoj da Wellingtonanoj laŭ la Cseh-metodo. Longtempe li estis la "lumturo" de la Wellington Esperanto-Rondo. Nelson ankaŭ fervore propagandis pri Esperanto kaj regule verkis leterojn kaj artikolojn kiuj ofte aperis en la tagĵurnaloj.

Por Nelson, la instruado kaj disvastigo de Esperanto estis celo kaj intereso dum la tuta vivo—lia sango ne estis ruĝa sed verda!





ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

estas komuna eldonaĵo de la Aŭstralia Esperanto-Asocio kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio.

La Aŭstralia Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Kep Enderby, 2 Phoebe St, Balmain NSW 2041.
Vic-Prezidantoj:
Vera Payne, 36 Donegal Road, Floreat Park WA 6014.
Max Wearing, 30 Westbury St, Hackney SA 5069.
Sekretario: Ray Ross, 41 Agnes St, Sunnybank Qld 4109.
Kasisto: Owen Loneragan, 16 Deverell Way, Bentley WA 6102.
Membrokotizoj: AUD$30 por individuo, klubo, kc, (+$5 por familiano[j] ĉe la sama adreso); $20 (minimume) por pensiulo aŭ studento. Bonvolu sendi vian kotizon al la kasisto. Ĉiujn nomo- aŭ adreso-ŝanĝojn nepre sendu al la redaktoro: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio.

La Nov-Zelanda Esperanto-Asocio:
Prezidanto: Brian Fox, 634 South Titirangi Rd., Auckland 1007. ☎ 9-817 8244.
Sekretario: David Rockell, 5-71 Princes St, Otahuhu, Auckland 1006. ☎ 9-270 3669.
Kasisto: Jackie Fox, PO Box 41-172, St Lukes, Auckland 1003.
Membrokotizoj: NZ$30 por individuo; $40 por geedza paro; $10 por studento aŭ junulo (< 20-jara). Kluboj po $1 por ĉiu ano, maksimume $15.

Ekster Aŭstralazio abono al *Esperanto sub la Suda Kruco* kostas 55 ned. gld., kio inkludas aerpoŝtan sendadon. Oni povas mendi la gazeton ĉe UEA; aŭ pagi en la konton ĉe UEA de la Libroservo de AEA, konto **aealw**, kun samtempa informo al la Libroservo de AEA. Oni povas mendi rekte de la Libroservo de AEA pagante per 37 IRK (aĉetitaj post februaro 1992), aŭ per bankĉeko en Aŭstraliaj dolaroj AŬ$44; sendu rekte al la Libroservo de AEA. En Usono abono kostas US$28 kaj mendeblas ĉe ELNA.

Bonvolu informi la redaktoron: D-ro Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562, Aŭstralio, se via nomo aŭ adreso estas neĝuste presita sur la adresslipeto. Sendu ĉiujn komunikaĵojn, artikolojn, librojn por recenzo kc. al la redaktoro.

Artikoloj de aŭtoroj nomitaj estas © 1994 de la respektivaj aŭtoroj. Ĉio alia en ĉi tiu numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* estas © 1994 de la Aŭstralia kaj la Nov-Zelanda Esperanto-Asocioj. Represo de enhavaĵo estas permesata, kondiĉe ke la fonto estas nomita. Ĉi tiu numero de *ESK* estas perkomputile kompostita de Donald Broadribb, per Macintosh Classic II kun Sistemo 7.1, uzante Microsoft Word 5.1; kaj Apple OneSkanner kun Ofoto 2.0.

Wholly printed in Australia. Typeset by Donald Broadribb, 46 Great Eastern Highway, Bakers Hill WA 6562. Printed by Snap Printing, 921 Albany Highway, Victoria Park East WA 6101.